

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara Esperantista Asocio

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Adreso: SOFIA, poŝtkesto 233

Jaro XV

Marto-Aprilo 1934

№ 7-8



Cvetana Simeonova-Gateva

La natura homa nutraĵo

Есперанто и българската литература *)

Нашата литература, за която чужденците знаят твърде малко и която още няма свое особно място въ реда на европейските литератури е представена на чуждия свят и чрезъ многобройни преводи на международния езикъ есперанто. Невъроятна на пръв погледъ, но преведени сж всички по-видни наши писатели, като се започне съ П. Р. Славайкова, Каравелова, Ботева и Вазова до най-младите — Багряна, Каралийчевъ, Разцветниковъ, Фурнаджаевъ, Панталеевъ, Далчевъ. Пропагандата на българската литература е организирана въ няколко съвсемъ частни инициативи, които отъ редица години насамъ вършатъ своята извънредно ползотворна за българската литература и култура работа. Известно е, че съ появата на първи есперантисти у насъ почватъ преводи на български писатели, поместяни било въ наши, било въ чужди издания. Такива чужди издания, нумера на международни библиотеки, сж отдълни сбирки отъ творби на Ив. Вазовъ (Български разкази, *Bulgaraĵ rakontoj*, „Internacia Biblioteko“, № 13, Berlin прев. Ат. Д. Атанасовъ) и на Г. П. Стаматовъ (Съвременни разкази, *Nuntempaj rakontoj*, „Internacia Mondliteraturo“, № 8, Leipzig, прев. Ив. Х. Кръстановъ), излезли доста отдавна, посрещнати много добре отъ международната читателска публика. Центъръ на пропагандата на българската литература, обаче, представя органътъ на българските есперантисти „Bulgara Esperantisto“, който излиза непрекъснато вече петнадесетъ години и се разпраща по всички краища на свѣта. Въ него редовно се поместятъ информации за всичко значително въ нашия културенъ животъ, като съ това се дава възможностъ на чуждия святъ направо и отъ най-достоверенъ източникъ да се

*) Съ удоволствие поместваме — съкратено, по нѣмане място — статията на познатия критикъ и нашъ съидейникъ г. П. Динековъ, за да видятъ колко несправедливи сж упреците на нѣкои скептици, че есперантистите не били добри родолюбци.
Редакцията

осведомява за това, което става у насъ. Въ това списание намиратъ място описания на българската страна и народъ, сведения за българската история, снимки илюстриращи България. Чрезъ органа на българските есперантисти именно чужденците можаха да научатъ за такива голѣми културни епохи и движения като Златния вѣкъ на Симеона, Богомилството и др. Ала това списание най-много допринася за пропагандата на българската литература. Редовно въ него се явяватъ преводи на български писатели, сведения за нашия литературенъ животъ и т. н. Разнообразието на имена на преведени български автори най-добре личи отъ това, което редъ години се дава въ това списание. Така напр. въ годишнина седма (1925—26 год.) сж поместени надъ 40 преводи и около 10 статии за българската литература. Сжщо тъй и за българската народна пѣсенъ. Три специални книжки отъ тая годишнина изцѣло сж посветени на Хр. Ботевъ, Н. Райновъ и Д. Дебеляновъ.

Другъ значителенъ центъръ за пропаганда на българската литература е „Българо-есперантската библиотека“ на Ив. Х. Кръстановъ. Отъ горната библиотека сж издадени десетина книги, отъ които за случая по-важни сж: 1) *La Bulgara lando kaj popolo* (Българската страна и народъ), въ която се разглежда България въ всѣко отношение и съ която авторътъ допринесе много за пропагандата на българщината въ чужбина — много повече отъ различните специално създадени за тая цель фондации и инициативи. Тая книга има грамаденъ успѣхъ на всѣкъде, — явиха се за нея много възторжени отзиви, резюмира се на чужди езици съ следното ласкателно за насъ заглавие „*Какво можемъ да научимъ отъ българския народъ*“ и за сжщата виденъ чужденецъ пише: „Вие българите можете съ такива съчинения да спечелите много повече отколкото съ войни; фактъ е, че Васъ съвсемъ малко ви познаватъ“. 2) Българска антология, обемиста книга отъ 250 стр. въ която сж застъпени 40 български автори. Непреодолими сж били прѣчките, които сж из-

пъкнали при съставянето ѝ. Но голѣмъ е ефектътъ, който тя произведе. Като прѣка последица отъ нейната поява бѣ интересътъ, който нѣкои чужди срѣди показаха къмъ българската литература. Така напр. отъ есперантскитѣ преводи се преведоха на нѣкои национални езици известни кжсове, десетина разкази сж препечатани въ литературния отдѣлъ на голѣмия американски есп. сборникъ „Universala metodo“, а отъ далечна Япония бѣха поискани голѣмо количество отъ нея. Сжщо тѣй нѣмаме възможностъ да възпроизведемъ и стзивитѣ, твърде ласкателни за нашето национално самолюбие, които антологията предизвика.

Да не поменаваме честитѣ преводи изъ българската литература, редовно помѣстяни въ голѣми международни списания, каквото е напр. Женевското списание „Esperanto“, обемистия литературнъ седмичникъ „Heroldo de Esperanto“ въ Кьолнъ, илюстрираното „Literatura Mondo“ въ Будапеща, нито за услугата, която правятъ на българската култура ония есперантисти, които, чрезъ кореспонденции до свои познати изъ цѣлъ свѣтъ ежедневно вършатъ пропаганда на българската култура, литература и изкуство. Да не поменаваме и за сказкитѣ, които нѣкои пѣтуващи по свѣта българи държатъ на международния езикъ за България, каквито бѣха напр. лекциитѣ на неуморимия пропагандаторъ на българщината Ив. Х. Кръстановъ въ Франция, Англия, Белгия и други страни по време на землетресението. Дейността на есперантиститѣ не свършва до тукъ. Смѣтаме за излишно да поменуваме за още много нѣщъ, нѣкои отъ които сж вече известни. Нито пѣкъ имаме възможностъ да се спремъ на онова, което още би могло да се направи въ тая насока.

Въ заключение трѣбва да подчертаемъ, че чрезъ своята дейностъ българскитѣ есперантисти правятъ неограничена услуга на нашата култура изобщо и литература въ частностъ. По тоя начинъ тѣ се явяватъ единъ могъщъ факторъ за пропаганда на българщината предъ международния свѣтъ и, безъ съмнение, чрезъ своята неуморна, безшумна дейностъ допринасятъ твърде много за издигането на България въ очитѣ на свѣта.

Петъръ Диневъ

1934

Printempo

Ho, mia eta kaj enigma Lila,
knabino suna de l' aroma tag —
vi venis jen en la printempo brila
kun via strange-ritma kora bat'.

Serene vido de vizaĝo via
kaj tiu loge mola korpa varm'
de l' eleganta milda korp' pasia —
ja estas tio stranga, stranga ĉarm'.

Mi brulas apud vi en fera fajro
kaj svinge, ŝtorme kantas la anim'.
Hodiaŭ en la urbo estas Majo —
jen: verdaj buloj floras sur pavim'.

Mi sentas kiel bole stormas sango
sovaĝajn vejnojn de l' petola knab'
dum puncas kaj aromas via vango —
kuraĝe kison prenas mi kun rab'.

Silente, tiam, longe vi rigardas
tra l' sunaj tagoj de l' printempa land' —
kaj niaj: korpoj, sango lule ardas
en nekomprena — sed serena am'.

Parsifal

Mia revo

En malsana Brust' batala flamo
Malkvieste brulas por libero,
Penso mia revas pri la amo,
Interfrata amo sur la tero.

Ploron sklavan mi ja ne forgesos,
Pro ĝi mi batalos ĝis la mort',
Kaj mallumo en mi ne progresos,
Ĉar ne kredas mi en vanta Sort'.

Nikolao G. Kolarov

Trompito

Oh, ne forgesu vi pri tiu hor',
La hor' de nia reciproka am'.
Vi petis tiam per tremanta kor'
Kaj amis min kun flam'.

Memoru ĉiam pri tiu vesper',
Kiam vi mem ĉe l' birda kanto
La finon metis al mia Esper'
Per via novamanto...

Kolarov

Serĉo

Mi serĉis Dion de ĉielo
Kaj amon serĉis ĉe virino,
Sur stratoj marŝis sen ĉapelo
Kaj serĉis veron en la vino...

Bedaŭre, mi ne trovis Dion
Nek de ĉielo, nek de tero,
En kor' virina mi alion
Ne povis trovi ol mizeron...

Ĉar Dio estas ekster kono
Mi ĉesis serĉi la edenon,
— Dion mi trovis en la bono,
En orfa koro — amsubtenon.

P. Jordanov

Esperantaj proverboj

Tuj kiam konataj — tuj kaptataj.
Se decidis la sorto, helpos neniu forto.
Fiŝo serĉas dronon, homo serĉas bonon.
Enspezo postulas elspezon.
Suldo ne makulas, sed pagon postulas.
Ne riproĉu spegulon, se ĝi montras
nigrulon.
Domojn ornamas ne tukoj, sed kukoj.
La plej terura turmento estas tiu, kiu
ne mortigas.
Kion mi povas, tion mi elŝovas.
Ne ŝovu vian nazon en fremdan vazon.
Malsato ankaŭ ne estas frato.
Du saĝoj valoras pli ol unu.
La vipo ne disrompas hakildorson.
Kiu sin jungis, tiu sin dungis.
Kiu multon ekscias, baldaŭ maljuniĝos.
Neniu tago sen bona ago.

Kolektis: I. H. K.

En la lando de la rozoj

(literatur-sciencia etudo)

de Ivan H. Krestanov, L. K.

La kreskaĵaro de la Balkana Duoninsulo kaj precipe tiu de Bulgarujo prezentas grandan intereson pro la specifa geografia situacio, kiun okupas tiu ĉi lando, lokita sur la vojo liganta Orienton kaj Okcidenton. Tiu ĉi situacio favoras tutnature la disvolviĝon de varia kreskaĵaro, enhavanta akre kontrastajn elementojn. Efektive, la bulgara kreskaĵaro disvolviĝis sub la klimata influo de Mediteraneo kaj Centra Eŭropo.

Aliparte, dank' al la malebena grundo sur tre konsiderinda spaco, samkiel al la specifaj kondiĉoj de l' klimato, la lando posedas multnombrajn specojn da vegetaĵoj kreskantaj tute aparte en certaj regionoj kaj tio ĉi estas de granda sciencia intereso. Ĉio ĉi faciligas la sukceson de multaj variaĵoj, kies nombro multe superpasas tiun de kelkaj landoj pli vastaj ol Bulgarujo. La listo de la vegetaĵoj, starigita da la Bulgara Agrikultura Societo, montras, ke la nombro de la diversaj specoj de la kreskaĵoj en Bulgarujo estas 3616, de kiuj multaj variaĵoj.

La intereso montrita al la bulgara kreskaĵaro grandiĝas ankoraŭ pli, se oni konsideras, ke Bulgarujo estas — nerifuteble — bonega agrikultura lando: 74% de ĝia loĝantaro okupiĝas preskaŭ ekskluzive pri agrikulturo, kaj ĝia kreskaĵaro estas studobjekto de multaj lokaj kaj fremdlandaj scienculoj.

Inter la multnombraj kreskaĵoj kulturataj en Bulgarujo, la plej grava estas la tritiko, la plej eksportata la tabako, sed la plej interesa la rozo. Kiu ja ne konas la bulgarajn grenojn kaj precipe la bulgarajn tabakojn (lastatempe ankaŭ tabakoleon) kaj rozoleon?! La temo de la jena artikolo estas speciale la rozo: ĝia deveno, kulturado, rikoltado kaj distilado.

* * *

La rozkulturado estas tre grava branĉo de l' bulgara agrikulturo kaj la unika specife bulgara industrio.

La origino de la rozo reiras eble ĝis la komenco de l' mondo, ĉar dokumen-

toj pri tiu temo tute mankas. Interspaco da 3000 jaroj nin malproksimigas de la originoj de l' rozoj. Kaj dum tiu tuta tempo la rozo estis ĉiam objekto de ornamo, emblemo de beleco kaj temo de poeta kulto.

La antikveco lasis al ni pri tiu temo divesajn mitologiajn rakontojn. Ekzemple, oni rakontas, ke kiam la ŝaŭmantaj marondoj portis sur la bordojn de He-

Poste la Kristaneco kaj la Islameco lasis al ni multajn legendojn pri la rozo. Sed oni ne devas forgesi, ke jam antaŭe, Grekujo, Egiptujo kaj Haldeo lasis al ni skulptaĵojn, kie oni vidas, ŝtone aŭ ligne, rozflorojn. Post kelkaj jarcentoj la greka mitologio parolas al ni pri la rozo. En la Homeraj epopeoj la rozo estas tre ofte uzata kiel ornamaĵo. Herodoto ankaŭ donas al ni priskribon de rozo kun



Rikoltado de la rozoj en frua mateno.

lado la diinon de la Beleco, ili ĵetis kun la dia korpo de Venuso la semon de la rozo sur la teron, tiamaniere, ke subite lumaj floroj elkreskis ĉirkaŭ la diino, bonodorigante la ĉirkaŭan aeron per mirinda parfumo.

Alia poeta inventaĵo nin ĉeestigas la sanktan ĵuron de la bela Rozalio, kiu preferas la ĉarman Simedoron ol la diservon de Diano. La feliĉaj geamantoj ĵuras antaŭ la statuo de Himeneo. Tuj Diano kolerigita trapikas per sago la koron de l' juna Rozalio kaj ĝin ŝanĝis en dornan arbeton, kiu tuj kovriĝis de belaj blankaj floroj kolorigitaj en la sango de Venuso, kiu, fuĝanta antaŭ la furioza Marso, alkroĉis sin ĉe la dornoj de la rozarbeto.

sesdek petaloj en la ĝardenoj de reĝo Midaso en Makedonio. Aliaj parolas al ni pri alia speco de rozo de Filipo kun cent petaloj ktp.

Estas ĝenerale multaj legendoj kaj rakontoj pri la origino de la rozo, sed oni ne konas eĉ ĝis nun kun certeco la unuan rozon-patrinon de la Balkana rozo, kvankam oni supozas, ke ĝi devenas de la rozo de Damas.

La bulgara rozo aperas en Bulgarujo tuj post la invado de la turkoj kaj longatempe ĝi estas nur ornamaĵo. Antaŭ tio ĉi nenie estas demando pri la ekzisto de la rozo. Tamen estas certe, ke la rozo devenas de Hindujo. Ĝi estas transportita tra Persujo al norda Afriko kaj Eŭropo. Ĝia migrado daŭris pli ol

tri mil jarojn. Laŭ certaj informoj estas evidente, ke ĝia apero en Balkano datumas depost 300 - 400 jaroj. La hipotezo, ke la rozo devenas de Malgranda Azio, estas transportita post la turka invado. De tie ĝi direktiĝas tra Konstantinoplo al Adrianoplo kaj poste al Stara-Zagora kaj Kazanlik (Bulgarujo).

Tiamaniere la mirinda arbedo malligiĝas iom post iom de la pompaj portaloj, de la haremoj kaj kioskoj de l' sultanoj kaj ĉefoj turkaj por veni en Bulgarujon, kie ĝiaj floroj estas kun senegala dolĉeco.

Unue la disvastigo de la rozo estas tre malrapida. Ĝi postulas specialajn klimatajn kondiĉojn kaj sabloplenan grundon, netrovebla multloke. La unuaj kaj ĉefaj centroj en Bulgarujo, kie la rozo trovis grandan disvastiĝon, estas la urbetoj sude de l' montaro Balkano (antikve Hemus), nome: Stara-Zagora, Kazanlik, Karlovo kaj Klisura, kie vastaj rozkampoj disvolviĝis kaj kies florpolfumo ĉiam turnis specialan atenton. Tiu parto de Bulgarujo estas konata sub la nomo „Rozova Dolina“ (Roza Valo). Kaj efektive la aspekto, kiun tiu ĉi valo prezentas en monato Majo, kiam la rozoj floras kaj kiam la tuta atmosfero estas sorbigita de agrabla rozodoro, ravas eĉ la plej indiferentan homon; ĝi estas tiel bela, ke ĝi lasas en la animo de ĉiu vizitanto neforŝireblan memoraĵon.

Ĉiuj provoj, faritaj por enplanti tiun kulturon en Norda Bulgarujo, Malgranda Azio kaj Norda Afriko, restis senrezultataj, kaj Suda Bulgarujo restas la unika lando, kie la rozoj prosperas kiel kampokulturo; ĝi estas la sola liveranto al la parfumindustrio de tiu valora rozekstrakto, konata sub la nomo „rozovo maslo“ (roza oleo).

Laŭ la statistiko de 1908 estis en Bulgarujo 45,577 parceloj prisemitaj de rozarbedo kun areo da 78,627 deka-roj aŭ 0.19 de la tuta areo, kaj 300,000 rozkulturistoj. Ĝis la milito tiu ĉi areo grade pligrandiĝis, sed pli malfrue haltis kaj eĉ malpligrandiĝis. Dum la lasta milito la landlimoj de Bulgarujo estis fermitaj kaj tiel la granda bazaro de la rozoleo mankis al ĝi. Jen tio ĉi devigis

multajn produktantojn elradikigi siajn rozejojn por ilin transformi en grenkampojn. Tio ĉi estas unu el la ĉefaj kaŭzoj por la malpligrandiĝo de la areo dediĉata al la rozokulturo. Sed ĉar tiu ĉi kulturo estas fiero de Bulgarujo kaj porviva demando por la industrio, lastatempe la bulgara ŝtato ekokupiĝas per la transporto, reorganizo kaj plibonigo de la tuta afero, kiu estas vera orfonto. Tiel la bulgara rozokulturo kaj rozindustrio en la vetbatalo kontraŭ Malgranda Azio kaj Suda Francujo certigos sian finvenkon kaj almitos la mondmonopolon de la komerco kun rozoleo.

* * *

Nun ni faru spiritan promenon en la Valon de la rozoj, kie vivantaj rozoj inter la rozoj plenigas la bonodoran aeron je kantoj. Ĉu estas fabelo, paradizo? — Ne! Estas pura realaĵo kaj surtere! Sed vi devas leviĝi frumatene, kiam la kampoj estas kovritaj de rozoj; alie vi vidos neniam rozojn. Tiu ĉi mistero klariĝas per la fakto, ke, por pli bona produktokvanto de rozoleo, ĉiuj elburĝoniĝintaj floroj devas esti ŝirkolektitaj jam je la unuaj horoj de l' tago.

Estas la sepa horo matene. La ĉielo pleniĝas per blankaj, flokecaj nubetoj, ruĝiĝantaj sub la unuaj sunradioj. Estas ĉarma bildo la procesio de la bulgarraj junulinoj, sanaj vilaĝaninoj kun skarlatataj vangoj, rikoltante la freŝajn rozojn, velurecajn, delikatajn kiel punktoj. Estas vera simfonio de rozoj subtenata per la facila gamo de delikata parfumo, kiu venas de la florkronetoj. La tuta atmosfero estas sorbigita de ĝiaj dolĉaj efluvoĵoj ĝis tia grado, ke la rozodoro vin persekutas ĉie kaj vi ĝin retrovos eĉ en la domoj, en la manĝaĵoj mem, kiujn oni prezentas al vi, en la vino, kiun vi trinkas. Proksimiĝu, krom tio, al la distilejoj, tiam estas paroksismo kaj multe da personoj suferas restante kontakte kun la distililoj. Tiel okazis kun la unua bulgara suvereno, princo de Battenberg, kiu pro sia abomeneto kontraŭ tiu tro intensega aromo, neniam fariĝis populara en la Valo de la rozoj.

Tiel, la florkronetoj estas rikoltataj en la momento mem, kiam ili estas plej freŝaj, plej ĝuplenaj, la matenon mem de ilia elburĝoniĝo. Ĉiu malfermiĝanta rozo, ĉiu vekiĝanta burĝono estas senkompate falĉata kun sia verda kapsulo per la ungoj de l' junulinoj kaj ĵetata en la korbon. Antaŭ tiu ĉi buĉado, la floro defendas sin kiel ĝi povas, ĉar ne estas rozoj sen dornoj, kaj la manoj ne eliras sen malbelaj gratvundetoj el tiu pitoreska „vinberrikolto“. Je la naŭa horo matene — iom pli malfrue, se la ĉielo estas kovrita — la rikolto ĉesas, ĉar la unuaj sunvarmegoj, sekigante la florkronetojn, malfortigas la parfumon.

Krom tio, la distilado devas okazi la tagon mem, kiam la rozoj estas ŝirkolektitaj; se ne, la petaloj velkas, perdadas sian aromon kaj donas malpli bonkvalitan ekstrakton.

La lastajn jarojn kilogramo da floroj kostis kvar bulgarajn levojn aŭ, laŭ la taga monkurzo, ĉirkaŭ sesdek francajn centimojn. Estas bezonaj almenaŭ mil rozoj por unu kilogramo da floroj. Unu hektaro ordinare liveras proksimume tri mil kilogramojn aŭ tri milionojn da floroj, kiuj havigas siavice unu kilogramon da ekstrakto. Sciante la prezon de tiu ĉi (ĉ. 28,000 b. lv. aŭ 5,000 fr. fr. por kilogramo), la produktokvanto estus tre gajniga, se la ĝardenistoj-vilaĝanoj ne renkontus grandajn malfacilaĵojn: printempa frostoj, densa hajlo, granda sekeco aŭ malsekeco kaj fine malsano, ĉar la rozarbeto, kiel ĉiuj kulturataj vegetaĵoj, havas siajn malamikojn — insektojn aŭ parazitojn (lastatempe oni malkovris la skarabeton konatan sub la scienca nomo „*Argilus foveicollis Mars*“).

Tiel la rozkulturisto, tute kiel la vinberkulturisto kaj la terlaboristo, konas la senĉese renoviĝantajn zorgojn kaj timojn pri la neniigo de la rezultatoj de siaj penoj, pri malbonaj rikoltoj. Vere, tie ĉi ne temas pri nutra vegetaĵo, sed pri malforta rozburĝono. Kaj la spektaklo posedas allogan ĉarmon, elvokas tute vilaĝan poezion, kiun oni retrovas tre malmulte ĉe aliaj kulturoj, kie la homa apetito kaj la soifo ŝajnas tre senpere interesataj...

Sed jen ni estas sub malgrandaj remizoj en sendetala instalaĵo: la distililoj, starigitaj unu apud la alia kaj funkciantaj sub infera fajro. Ĉio fariĝas en malkovrita loko. Se ni proksimiĝas al tiuj vilaĝaj laborejoj, la rozodoro estas tiel forta, ke ĝi pikas la okulojn, incitas la flarsenton, dolorigas la kapon, eĉ en la malseka varmeco, kiu eliĝas el la aparatoj. La distililo mem estas tre simpla instrumento: ĝi estas primitiva kaldronego, kie la rozoj estas distilataj kaj kies vaporo, densigata en gutetoj, estas kolektata en specialaj boteletoj. Ekzistas ankaŭ moderna maniero: ĉ. 20 fabrikoj. Lastatempe fondiĝis ankaŭ Roza Banko, ŝed manko de kapitalo estas sentata.

La ricevita fluidaĵo estas nomata „rozova voda“ (roza akvo) kaj servas por diversaj uzadoj en la farmacio (lavo de la okuloj), en la sukeraĵejoj, por aromigi glaciaĵojn aŭ pastelojn. Sed el ĉiuj produktaĵoj, kiujn donas la reĝino de la floroj, la esenco, kiu estas ricevata el la rozakvo kaj kiu servas kiel bazo al ĉiuj parfumoj, restas nature la plej ŝatata, ĉar ĝi valoras sian orpezon. Tial ĉiu produktanto estas tre zorgema pri ĝi. La „muskalo“ aŭ boteleto, kiu ĝin kaŝas, estas tuj plenigata, ŝtopata, sigelata, por malhelpi ĉiun elvaporigon.

Kaj ĉiu posedanto havas sian specialan anguleton, sian ŝrankon, sian keŝegon, sian... kavon da rozesenco, kies ŝlosilo neniam lin forlasas. Ĉu vi volas aĉeti? Tiam estas tuta ceremoniaro, ĉar dum la valorega esenco eliras el sia kaŝejo, s-ino la domomastrino aperas en siaj plej bonaj ornamvestoj kaj prezentas al vi, krom la klasika taso da bulgara kafo kaj glaso da akvo, kulereton da „sladko“, konfitaĵo de prunoj aŭ ĉerizoj, eĉ de la petaloj de la rozoj. Ne rifuzu, ĉar la bulgara gastamo havas siajn precizajn ritojn kaj vi povus ofendi vian gastigantaron.

* * *

Sed ekzistas bona kaj malbona rozesenco aŭ rozoleo, ekzistas ankaŭ falsigita... Kiel rekoni ĝin?

La plej uzata rimedo estas la glaciigo; la pura rozoleo malfluidiĝas ĉe la temperaturo de 14 aŭ 15 gradoj, dum la mik-

sita postulas, por malmoliĝi, pli malaltan temperaturon. Sed ankaŭ tiu ĉi rimedo ne donas la deziratan garantion pri la pureco de l' komercaĵo, ĉar la miksaĵo de aliaj produktaĵoj permesas ankaŭ rigidiĝon je la volata grado. Nun ankoraŭ ekzistas nenia pli bona kriterio ol... la nazo mem. Nur sperta flarsento permesas distingi, preskaŭ kun certeco, la falsigon. La parfumo de l' rozesenco estas ja amara, akra, brula, ĝi estas ekstrema koncentraĵo, absoluta kvintesenco de la rozodoro. Subtila kaj delikata flarkapablo povas rekoni tie la facilan falsadon produktitan de alia esenco (plej ofte oni miksas la veran rozoleon kun oleo de geranio). Tiel, ekzistas en la Roza Valo aro da konataj specialistoj, kiuj estas por la rozoleo tio, kio estas la gustumistoj por la vino. Kaj la plej bonaj el ili povas, laŭ la forto de l'odoro de via specimeno, montri al vi eĉ la daton kaj lokon de la distilado. Sed ĉiuokaze la bulgara rozoleo havas nenian egalan al si.

La produktado de la rozesenco grandiĝas proporcie kun tiu de la rozejoj. Tiel, en 1912 tiu produkto atingis 580,958 boteletojn po 4.8 gramoj da rozoleo; la tuta produkto estis 2,788.5 kilogramoj. Meze Bulgarujo produktas 3,000 kg. da rozoleo. La valoro de ĉiuj rozĝardenoj estas 24 milionoj oraj levoj.

La grandaj bazaroj, kie Bulgarujo vendas siajn rozesencojn, estas Germanujo, Francujo, Usono, Anglujo k. a.

* * *

La reĝino de la floroj ne kontentiĝas doni la rozakvon kaj rozoleon. Efektive, kiam la rikoltistinoj finis sian matenan „vinberrikolton“, la ekstremaĵo de iliaj fingroj kovriĝas, precipe dum varma vetero, per tre maldika tavolo de glueca poleno, kiun oni skrapas per klingo de tranĉilo kaj kiu fine estas knedata en malpezaj buletoj grandaj kiel pinglokapeto; ĝi estas la „rozciro“, kiu, laŭ la opinio de kelkaj fumantoj, estas la plej grandvalora produktaĵo de tiu kulturo.

Sed Eŭropo neniel konas ĝin, ĉar Azio pasiege amas ĝin, kaj la delikategaj turkoj envie vetbatalas por tiuj malgrandaj bonodoraj grenoj, kiujn ili metas en la tabakon de siaj nargileoj, el kie la fumo eliras tre agrable sorbigita de facila rozparfumo disvastiĝanta en la apartamentoj.

* * *

Fine ni citu, por esti kompletaj, la konfitaĵon, kiun la bulgaraj mastrumantinoj preparas el la rozpetaloj miksitaj kun sukero, la tuto kuirita sur forta fajro kiel la ordinara ribo. La rezultaĵo havas cetere nenion bongustan kaj konsistigas pli vere specon de laksilo... Tiel, la plej bela el la floroj povas fini siajn tagojn en la kaserolo Sed ĉu ne ofte en la mondo la plej belaj aferoj havas la plej malbonan sorton?

Езикътъ се е родилъ като срѣдство за изразъ и разширение на живота. Общитѣ преживѣвания сж дали началото на езика, разумниятъ животъ — разширението му, а излишествата и прекомѣрнитѣ желания — злоупотрѣблението съ него.

Международниятъ езикъ е билъ блѣнъ на всички издигнати души, които сж мечтаели за човѣщина и братство презъ всичкитѣ времена. „Есперанто“ е реализираната мечта на съвременницитѣ — рожба на сжщото това общочовѣшко чувство.

Всички други езици иматъ и носятъ тежки грѣхове спрѣмо това чувство: — съ тѣхъ сж водени спорове, отваряни войни. Есперанто е едничкиятъ езикъ безъ това тежко наследство. Винаги до сега той е носилъ Миръ и Братство между всички хора, отъ всички раси, отъ всички континенти. Съ това той е станалъ мостъ, по който Бждещето на човѣчеството се приближава къмъ сегашното.

Любомиръ Лулчевъ

Dank' al mia esperantistigo!...

Dum mia militservado en 1901—1902 en Tirnovo, mi konatiĝis kun esperanto kaj enskribiĝis kiel esperantisto rekte ĉe



Penko Stoev

D-ro Zamenhof, en Varsovio, de kie mi ricevis nomaron de ĝistiamaj esperantistoj, entenanta ankaŭ mian nomon.

Multon mi imagis, ke oni povas atingi per esperanto kaj mi vivis kun agrablaj iluzioj, ĝis kiam plej poste, en 1911, mi povis viziti la 7-an universalan kongreson en Antverpeno — Belgujo.

Jen miaj unuaj impresoj de tiu kongreso, kiujn mi trovas en gazeto Dnevnik de tiama tempo.

„Post du tagoj malfermiĝos la kongreso de la esperantistoj! Sed ankaŭ la hodiaŭa tago restos neforgesebla por mi. Kvazaŭ en tiu momento alian lingvon, en Antverpeno, krom esperanton, oni ne parolus.

Kongresanoj venis el diversaj landoj. El Anglujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Usono, Brazilujo k. a. Reprezentantoj estas de pli ol tridek nacioj. Renkontiĝas sur la stratoj, portantaj sur sia brusto verdajn steletojn — emblemon de esperanto; ili haltas, demandas unu la alian; respondas — ĉiam en esperanto. Kaj oni ne povas rekoni unu de alia la naciecon; eĉ tio ne estas bezonata nun,

kiam Antverpeno prezentas urbon de fratigita homaro!

Ĉiuj kunvenas en la „Akceptejo“, eĉ amasiĝas. Estas tie nek francoj, bulgaroj, germanoj, amerikanoj; vi ne povas aŭdi francan, germanan, anglan lingvon. Vi aŭdas nur esperanton, vi vidas nur esperantistojn. Unu homaro — unu lingvo! Nepriskribeblan ĝuon mi sentas, komprenas ilin, ankaŭ ili — min.

Scivoleme sin turnas iu al mi:

— Sinjoro, ĉu vi estas franco?

— Ne, — bulgaro — respondas mi.

Kunparolanto estas anglo! Ni interparolas 20—30 minutojn kaj ni ne povas ekkoni unu de alia la naciecon!

Rimarkinde estas, ke el aliaj landoj estas venintaj pli aĝaj personoj, eĉ ĝemaljunuloj: viroj, virinoj, precipe el Anglujo. Mi vidis kaj interparolis kun blankbarbulo anglo — esperantisto, kiu venis kongreson kun siaj edzino kaj gefinfanoj. Kaj mirinde — ĉiuj parolas esperanton!

En Bulgarujo okupiĝo pri esperanto estas preskaŭ konsiderata kiel junecafero — ne inda por pli aĝaj, por pli aŭtoritataj. Male, tie ĉi estas eminentaj personoj, fervoraj esperantistoj, kun antaŭeniranta aĝo samideanoj, profesoroj: Karlo Bourlet, Emil Boirac, generalo Sebert k. a.

Mirinda estas esperanto! Alian lingvon, krom ĝi kaj bulgara, mi ne parolas kaj mi havas plezuron kompreni kaj esti komperenata, parolante kun svedoj, braziloj, ĉinoj, kvankam mi ne scias eĉ vorton de ilia lingvo, ankaŭ ili — bulgaran.

Ĝis hodiaŭ venis proksimume mil esperantistoj, sed ĝis dimanĉo ilia nombro, laŭ akiritaj sciigoj kreskos ĝis 2000. La organizantoj de la kongreso, helpataj de la belga registaro mem, faris ĉion eblan por esti plej agrable pasigita la kongresa semajno. Al kiu ajn policisto vi vin turnus, vi aŭdus respondon en esperanto. Se vi eniras tramveturilon, parolu esperanton kaj oni servos al vi. Super multaj restoracioj, kafejoj, hoteloj flirtas esperantaj flagoj.

Vidiĝas surskriboj: Oni parolas esperanton. Dum la vintro en esperantaj kursoj oni instruis la lingvon al policistoj, tramveturistoj, hotelistoj, kelneroj. Kaj hodiaŭ tiom agrable estas loĝi en Antverpeno, eĉ por homoj ne sciantaj aliajn lingvojn, krom sian gepatran kaj esperanton. Kaj similaj inter esperantistoj — kongresanoj estas multaj.

Du tagoj ankoraŭ restas kaj mi havas ne sentitan ĝis nun plezuron saluti la kongreson kaj aŭtoron de Espe-

ranto D-ro n Zamenhof* en la nomo de Bulgara esperantista ligo, kies oficiala delegito mi estas“.

Plovdiv.

Penko Stoev

(eks-direktoro de Nacia Banko)

*) El Bulgarujo ni du kun S-ro Ivan Krestanov havis feliĉan okazon konatiĝi kun D-ro Zamenhof kaj premi lian manon. Mi tion faris an Antverpeno 1911, kaj S-ro Krestanov — en Krakovo 1912 kaj Berno 1913.

Penseroj

Poeto estas sorĉisto de l'parolo...
Li transformas en belecon, amon kaj ĝojon ĉion, kion li tuŝas. Lia ago estas plej granda pruvo pri la ebleco de l'miraklofarado.

* * *

La mondo estas grandega muzeo, kaj la vivo — promenado tra tiu muzeo.

Kaj la plej bona lernejo por lerni la arton estas la vivo.

* * *

Artpentristo kaj poeto estas kreantoj de la ĉarmo, sed de tia ĉarmo kiu sin metas en servo de l'bono...

Artpentristo kaj poeto estas moralistoj, kiuj parolas pri moralo ne per admonoj, sed per figuroj...

* * *

Poeto ne kreas, sed rekreas. Li donas novan sencon al paroloj jam delonge eldiritaj... La ĉielo havas iutempe aspekton de io malnoviĝanta. Poeto rekolorigas la ĉielon.

* * *

Penso senvalora neniam plibeliĝas per stilaj ornamaĵoj.

Balaaĵo ne ĉesas esti balaaĵo eĉ se ni lumigos ĝin per elektro.

* * *

Neniam permesu al via plumo trokuri vian penson.

La bona verkisto estas fininta sian laboron, t. e. li estas jam doninta al siaj ideoj sangon kaj karnon, kiam li altbliĝas por skribi.

El „Апофтегми“
de St. Mihajlovski

Tradukis: T. Kamengradski

Есперанто трѣбва да заеме високо мѣсто въ всѣка просвѣтена държава. Нашата малка страна, чийто езикъ е толкова малко познатъ въ чужбина, особено много трѣбва да ратува за това. Есперанто трѣбва да се въведе наново въ всички срѣдни училища и не вече факултативно, а задължително.

Ст. Омарчевски

Malnova kaj nova ideologioj de Esperanto

(koncizaj pensoj eltiritaj el esperantaj gazetoj)

Ĉiu ideologio estas ido de sia tempo. Esp. kiel idea fluado ankaŭ estas tia. Zamenhof esprimis sian tempon kaj kreis Esperanton. Ni vidu la ideologion de la dua duono de l' 19-a jarcento, de l' komenco de 20-a j. c., kaj de l' jaroj senpere post la tutmonda milito. *La racio*, la intelekto, la prudento — jen la bazo de l' tiama ideologio. Tio estis ne ideologio de unuopaj pensuloj, sed tipigita ideologio de homaj amasoj kun la racio kiel bazo. La racio kreis la racionalismon*) kaj la racionalismo — Esperanton.

La homaj amasoj iam estis entiritaj en la ideoj por eterna paco, por Ligo de nacioj, por Paneŭropo kaj similaj produktaĵoj de l' racionalismo: nun la samaj amasoj ŝatas aŭtarkion, plivigligitan naciismon k. t. p. Iam oni konsideris la individuon, la racion, la spiriton, la sanan internaciismon; nun — la kolektivon, la kooperativon, la senton, l' animon, la naciismon, kaj super ĉio — la ŝtaton.

Vere estas, ke la ponto inter la pasinteco kaj la nuneco ne estas definitive rompita. Estas homoj „por kiuj la idealoj de l' 19-a jarcento estas ankoraŭ ĉiam sanktaj“. Sed se oni konfesas, ke ni vivadas en epoko de rompoj sociaj, ekonomiaj kaj politikaj, oni devas ankaŭ objektivite konfesi, ke la postmilita homo akiris tute malsaman ideologion ol la antaŭa.

Unu demando por ni esperantistoj: se la idealoj de l' 19-a j. c. — ido de kiuj estas Esp. — estas rompita kaj elfundamente ŝanĝitaj, kiaj estas la sekvoj de tio por Esp.? La esperantistoj varbis siajn adeptojn per du argumentoj: homegaleco kaj praktika neceseco de Esp. Se ĉi-tiuj argumentoj estis tute sufiĉaj, Esp. estus age disvastigita, precipe dum la epoko de l' racionalismo. Sed ni konsideras tute alion: Esp. ludis (-as) malgrandan lingvan rolon. El tio sekvas, ke nur la ĉi-supremenciitaj argumentoj ne estas sufiĉaj. Ni bezonas alion. „La Esp.-movado, kiu servu al la internacia interkompreniĝo, estu konstruata sur la naciismo, kiu estas la kerno de l' nuntempa ideologio“. (R. Rakuŝa).

La naciismo de l' grandaj nacioj entenas en si la imperialismon, al kiu servas ilia lingvo en la rolo de mondlingvo (angla, franca, germana lingvoj). Ĉe la malgrandaj nacioj estas tute alie: tie ni devas enkonduki Esperanton kiel mondhelp-lingvon. Tial Esp. ricevis sian disvastigon sur viva nacia fundamento.

La nova reorganizita Esp.-movado (la nova UEA) ne helpas multe, se ni iras sur la malnova vojo mekanike. Ni bezonas homojn, kiuj estu por dinamiko kaj agado.

Enterigu ion sanktan, karan, sed estu homoj realaj, kiuj ekkonas „la signojn de l' tempo“!...

Laŭ la jugoslava „Suda Stelo“ kaj „Heroldo de E.“

*) Racionalismo: filozofa doktrino, kiu neas la revelacion kaj pretendas krei ĉion per uzado de l' racio. Laŭ ĝi la ideoj devenas de la racio, sed ne de l' sperto.

Абонирайте се за сп. „Vegetarano“, органъ на Международ. Вегетар. Лига, год. абон. 50 лева. Представитель за България: П. Митковъ, бул. „Евлоги Георгиевъ“ 49 — София.

Сжцо за „La praktiko“, gazeto, kiu instruas kaj amuzas, год. абон. 140 лева. Представитель за България: Георги Гашевски, бул. „М. Луиза“ № 38, книжарница „Есперанто“ — София.



La komitato de la esp. societo „Espero“ kaj la Kontrola en Rusĉuko. Komisiono. (Unua vico: meze la prez. s-ro Ĥr. Stamboliev, dekstre la prez. de la K. K. Iv. Stanĉev, Dim. Ivanov, sekr.; maldekstre: Iv. Grozev, kasisto, Iv. Josifov, vicprez.; dua vico; dekstre M. Marinov, ano de K. K., f-ino Sijka Deĉeva, ano de la kom., Petranka Lazarova, bibl. kaj Angel Slavov, ano de la Kom.)

Nia vivo

Sofia. La esp. vesperfesto bonege sukcesis. La salono estis plenplena kaj la societa kaso havas grandan profiton.

— S-ro Hesapĉiev malfermis superan kurson. S-ro Pamporov transdonis la sian al s-ro T. K. Popov.

— Ĉe la malfermo de la III-a kongreso de la bulgaraj stenografoj, s-ro S. Hesapĉiev salutis je la nomo de la esp. stenografoj en Bulgarujo kaj fremdlando, akcentante pri la graveco de esp.

Ruse. Esp. societo „Espero“ aranĝis vesperfeston en la salono de la klubo de Radikala partio; ĉeestis 60 membroj kaj kursanoj. Ĝi estis malfermita per parolado de la vicprez., s-ro Iv. Josifov, kaj tosto la malnova pioniro de esp., s-ro St. Uzunov, ŝtata advokato; oni pretigis komunan vespermanĝon por la partoprenintoj. Estis ludita „La Espero“ de la ŝtata muzikistaro, kiu dancigis ĉiujn ĝis meznokto.

Bela-Slatina. Ekde 20. II. funkcias du kursoj sub la gvidado de s-ro R. K. Triĉkov kun 130 p. El ili 90 estas infanoj 8 — 14 jaraĝaj kaj 40 civitanoj.

La kurso daŭris ĝis la Pasko kaj finis per publika demonstracio kaj ekzameno. La iama societo restarigota. Oreho vo kaj B. Slatina infektitaj per . . . esperanto.

Oreho vo. Dum ĉi-jara sezono gviditaj entute 5 kursoj kaj post ilia finiĝo ĉiumerkrede kunvenoj kun prelegoj. Ĝis nun prelegis: en bulgara lingvo — N. M. Kocev — „Ideo kaj esenco de lingvo internacia“, en esperanto — Doĉo Dimitrov — „Servanteso kaj Don Kihoto“, D-ro Georgi pop Ivanov — „Infektantaj malsanoj kaj kontraŭbatalo de organismo“. Legitaj ankaŭ rakontoj, humoraĵoj k. a. Kun la infanoj oni lernas en esperanto la opereton „Printempo en ĝardeno“, prezentota dum la kongreso. La societa orkestro ankaŭ pretiĝas por la kongreso. La ekskursoj al insulo „Esperanto“ komenciĝis. Malgraŭ la frua tempo jam multaj gesamideanoj aliĝis al la kongreso.

Tirnov'o. La verda semajno de la lernanta grupo estis 26. II.—4. III. 1934 kun la jena programo:



Je 26. II. estis prelego de la lernanto de knaba gimnazio I. Kamburov je temo „Historio de la internacia lingvo“. Antaŭe la prez. de la societo, s-ro Bačvarov, malfermis la kunsidon, konatigante a publikon pri la senco de la semajno. Merkrede prelegis Petko Najdenov, lernanto de komerca gimnazio, je temo „Esenco kaj antaŭdestino de Esperanto“.

La 2-an de marto, vendrede, parolis Nikolao Rusev, lernanto de gimnazio, je temo „Apliko, adeptoj kaj kontraŭuloj de Esperanto“. Antaŭparolon faris la prez.

s-ro Valčanov.

Dimanĉe je 2¹/₂ h. komenciĝis la amuzo. Unue parolis nia malnova pioniro s-ro H. Bačvarov, profesoro ĉe la gimnazio. Temo: „Neceso de lingvo internacia“. Li klarigis, ke tia lingvo povas esti nur artefarita kaj nur esp.

Post tio deklamado, humoraĵoj, solokantoj kaj parolado esperante de s-ro Valčanov.

La gelernanta grupo en Tirnovo eldonis poŝtkarton kun esperanta teksto. Aĉetebla ĉe la grupo.

Равносметка

За прихода-разходитѣ на сѣюза отъ 1. VIII. 1933 година до 15. III. 1934 год.

ПРИХОДЪ

1. Отъ абон. на В. Esperantisto	7952 лв.
2. „ члн. вносъ	2340 „
3. „ стоки	31 „
4. „ разни	486 „
	<hr/>
всичко	10809 лв.

РАЗХОДЪ

1. Bulg. Esperant. бр. 1—6 вкл.	5920 лв.
2. Експед. В. Е.	583 „
3. Пощен. разноски	601 „
4. Канцеларски	225 „
5. Такси за пош. кутия	150 „
6. Заплати	—
7. Разни	315 „
	<hr/>
всичко	7794 лв.

Наличностъ къмъ 1. мартъ 1934 г. 3015 лв.

всичко 7794 лв.

XXI BULGARA ESPERANTO-KONGRESO

Orehovo — Bulgarujo

22-24 de Julio 1934.

Protoktanta
La urbestro
S-ro Sl. Torbov

Bulteno

№ 1

Adreso:
Lo—Ko—Ko
Orehovo

Karaj gesamideanoj,

La loka kongresa komitato havas la grandan honoron inviti Vin, ke Vi vizitu kaj partoprenu la XXI bulgaran esperanto-kongreson, kiu okazos en la malgranda, sed bela apudnuba urbo Orehovo (Rahovo a/D). Venonte tie Vi havos la feliĉon vidi la unikaĵon esperantistan-insulon „Esperanto“. De nia malgranda urbo, ni kredas, ke Vi revenos kum granda ĝojo kaj neforgeseblaj rememoroj.

1. L. K. K. konsistas: Honora prezidanto — S-ro Henriko Fiŝer, Prezidanto — D-ro Georgi pop Ivanov, sekretario — S-ro Doĉo Dimitrov kaj kasisto — Georgi Stanev.

Komitatanoj: S-roj R. K. Triĉkov, Nik. M. Kocev, Mih. Kraev, Hr. Terzijski-iv. Spasov, Vesel. Gerĝikov kaj Dim. Kovaĉev.

2. Kotizo: Ĝis la 1-a de julio 20 lv. kaj post tiu dato 30 lv. Por fremdlandanoj — 1 sv. fr. aŭ egalvaloro.

3. Donacoj: por la kongresa kaso danke akceptataj.

4. Aliĝiloj: dissendotaj al ĉiuj dezirantoj kaj societoj. Akceptataj nur ĝis la 16-a de julio j. k.

5. Nur aliĝintoj rajtas helpon kaj zorgon de la K. K.: rabatrajti-giloj por veturado sur fervojoj, zorgo pri loĝejoj, amuzado, ekskursoj k. t. p.

6. Loĝejoj: a) ĉe hoteloj kun rabato laŭ la grado proksimume ponokte 40, 30, 20 levojn sen matenmanĝo. Privataj domoj kaj komunaj loĝejoj.

7. Nutrado: por unu tago proksimume 35 lv. en unua-ranga restoracio.

8. Dumkongresaj ekskursoj: a) al insulo „Esperanto“, b) al la belaj urbaj vinberejoj kaj sur Danubo per boatoj.

9. Fakaj kunsidoj. Organizantoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn.

Notoj: a) La kotizo pagebla ankaŭ per bulgaraj poŝt-kaj ŝtatmarkoj nedifektitaj, b) La programo sciigota per dua bulteno, c) L. K. K. intencas organizi ekspozicion propagandcele. La samideanoj estas petataj sendi taŭgajn ekspoziciaĵojn.

Provizora programo de la XXI-a kongreso.

Sabate 21. julio: Renkontiĝo de la kongresanoj kaj la gastoj. Poste interkonatiĝa vespero.

Dimanĉe 22. julio: Solena malfermo de la kongreso. Posttagmeze ekskurso al la bela insulo „Esperanto“,

Lunde 23. julio: Raporto de C. K. kaj Kontr. Komitato. Posttagmeze lokaj kunsidoj, ekskurso. Vespere teatra literatura amuziĝo.

Marde 24 julio: Daŭrigo de la kunsido. Fakkunsido, posttagmeze. Prelego. Ekskurso kaj amuziĝo. Estas aranĝata vizito al rumanaj esperantistoj en Bukureŝto.

LoKoKo.

Запомнете, че **1133** е номерът на пощенската чекова сметка на Бълг. Еспер. съюзъ. Внесайте сумата само чрез нея като искате отъ пощата внонси бележки.

Есперантски новини

XXVI Всесвѣтски конгресъ на есперантиститѣ.

Както съобщихме въ брой 1—2, тазгодишниятъ всеесперантски конгресъ ще стане въ *Стокхолмъ*, шведската столица, отъ 4. до 11. августъ. Записалитѣ се до 1. априлъ плащатъ конгресна вноска 20 шв. крони, а тия следъ (тая дата — 30 шв. кр., срещу които иматъ право да участвуватъ въ всички конгресни работи и забави и да получатъ всички конгресни документи. Предконгреси ще станатъ въ Малмьо, Готтебургъ (Швеция) и Осло (Норвегия); ще се устрои излетъ и до най-северната частъ на Швеция — интересната Лапония, „дето се свършва свѣтътъ“, а следконгреси ще има въ Талинъ (Естония), Хелсингфорсъ (Финландия) и др. екскурзии.

До 29. мартъ сж се присъединили 700 конгресисти. Принцъ Карлъ отъ Швеция е приелъ да бжде въ почетния комитетъ на конгреса. Сжщо и шведската писателка Селма Лагерльофъ.

Може да сте видѣли западна, срѣдна и южна Европа, но северната заслужава много повече да се види. Общи пътувания отъ Балканитѣ до Стокхолмъ урежда нашиятъ ромънски съидейникъ S-ro J. Jonescu. *Vikurešto*, Str. Dr. Istrate, 10, Rumanujo.

Международниятъ Есп. Институтъ си има вече свой домъ въ Хага, Rieuwestr 172, осветенъ въ присѣдството на представителъ на Холандското М-ство на Нар. Просвѣта.

Събрание на естественици и други учени е станало на последния японски еспер. конгресъ въ Киото. Известно е, че много научни книги на японски иматъ на края резюме на есперанто.

Есп. изложба ще има въ левантския панаиръ въ *Тел-авивъ*, Палестина, 26. IV. — 26. V. Устроителтъ г. инж. P. Lanovicki, Kerem, Jerusalem, Palestino, моли за изпращане на *esperantajhoj*.

Тамъ, отъ 10. до 12. май т. г., ще стане и *първиятъ блискоизточень Есп. конгресъ*, за което на посетителитѣ се прави 25—50% отстъпъ по желѣзницитѣ и пароходитѣ.

XIV-иятъ международень конгресъ на работницитѣ (SAT) ще стане въ Валенция (Испания) на 3—8. августъ т. г. Адресъ на конгресния комитетъ: Hogno Hospital, 12, Valencia (Hispanujo).

Югославянскитѣ есперантисти празднуватъ 25-годишнината отъ проникването на есп. въ тѣхната страна и въ юбилейния брой на органа си споменаватъ съ благодарностъ името на нашия съидейникъ Ив. Х. Кръстановъ, който още въ 1909 г. е пропагандиралъ въ Бѣлградъ заедно съ руския академикъ Евстифѣевъ и сѣрбитѣ брата Будѣевацъ.

Сказки за България е държалъ на есп. и бѣлгарски въ нѣколко градове на Югославия нашиятъ съидейникъ П. Г. Пампоровъ. Нѣкои тамошни съидейници сж изказали надеждата, въ бждеще да се работи по-интензивно за опознаването и сближаването на съседнитѣ братски народи.

Автоматическитѣ телефони въ Амстердамъ носятъ есперантско пояснение за манипулирането съ тѣхъ.

Географскитѣ прегледъ въ Рио де Жанейро (Бразилия) редовно печати есп. резюме на всѣка статия.

— **Френскитѣ есперантисти** ще иматъ 31-ия си конгресъ въ Бордо, 19—21. май т. г., а *италиянскитѣ* своя 19-и конгресъ въ Милано на 14—24. априлъ т. г.

Индийскитѣ съидейникъ Лакшмисваръ Синха, ученикъ на Раб. Тагоръ, продължава интереснитѣ си сказки на есп. за Индия въ Балтийскитѣ и Скандинавски страни.

— **Айфеловата кула** въ Парижъ разпраща радио сказки на есп. за туризма въ Франция.

— **Еспер. Радио-курсове** разпращатъ 7 финландски станции, всѣка срѣда 19¹/₄ ч. Следъ плебисцитъ между слушателитѣ подиръ английски езикъ, есп. е получилъ най-много гласове.

— **Чехословашкото М-ство на желѣзницитѣ** позволява на есп. два да закачатъ въ всѣка гара табела съ адреситѣ на мѣстнитѣ есп. организации. Хиляди гари иматъ вече такива.

Vizitu Estonion! Съ тия думи започва есперантскитѣ проспектъ съ цвѣтна по-



ивка, географична карта, 26 илюстрации
разни полезни сведения за Естония,
паденъ и разпращанъ безплатно отъ
Central Officejo por Turismo въ гр. Tallinn,
Estonia

Пътеводни илюстровани книжки
съ цвѣтни краски на есп. сж издали и
градоветъ Любляна, Валенция и др.,
които могатъ да се получатъ безплатно
отъ туристичната служба на ЦЕА въ
Женева.

Туристическата служба на Универ-
салната Есперантска Асоциация въ Женева
съ финансова поддръжка на Бялистошкия
Магистратъ е издала въ 10,000 екз. „Илю-
строванъ пътеводителъ презъ Бяли-
стокъ“, родния градъ на Д-ръ Заменхофъ.
Разпраща се безплатно.

— Кога и въ България ще почнемъ да
подражавеме на горнитъ хубави начина-
ния? А ние имаме много повече нужда
отъ пропаганда въ чужбина!

Курсъ по есперанто

Склонение на съществител- нитъ и прилагателнитъ

При склонението на съществител-
ното, а сжщо и на прилагателното,
окончанието на именителния падежъ
остава безъ измѣнение въ всички па-
дежи освенъ винителния, който взема
окончание -n: bona patro, bonajn
patrojn. Другитъ падежи се изразяватъ
както и въ българския езикъ, съ по-
мощта на предлозитъ: de (на, отъ)
— за родителенъ падежъ. al (къмъ,
до, на) — за дателенъ и т. н.

Именителниятъ кой, какво:

(la) bona patro (la) bonaĵ patroj
добъръ баща добри бащи

Родителниятъ на (отъ) кого:

de (la) bona patro de (la) bonaĵ patroj
на (отъ) добъръ баща на (отъ) добри бащи

Дателниятъ кому:

al (la) bona patro al (la) bonaĵ patroj
на добрия баща на добритъ баща

Винителниятъ кого, какво:

(la) bonaĵ patron (la) bonaĵn patrojn
добрия баща добри бащи

и т. н.

La juna homo venis младиятъ чо-
вѣкъ дойде; la knabo havas novaĵn ŝuojn
момчето има нови обуца; la novaĵ
ŝuoj de la knabo новитъ обуца на
момчето; la domo de la pastro домътъ
на свещеника; mi skribas al mia frato
азъ пиша на моя братъ; transdonu sa-

luton al via patro предайте поздравъ
на вашия баща; ŝi sendis al li monon
per la poŝto тя му изпрати пари по
(посредствомъ) пощата

Винителниятъ падежъ и не-
говата форма иматъ широко прилагане
въ предаванетоъ съ точностъ прямия
смисълъ на предложението. Него упо-
трѣбаватъ:

1. за изразяване прѣко допъл-
нение: mi havas libron азъ имамъ
книга; mi vidas Ivanon азъ виждамъ
Ивана; Ivanon vidas min Иванъ ме
вижда; vi skribas leteron вие пишете
письмо; mi atendas vin азъ чакамъ васъ;
vi atendas min вие чакате менъ.

2. за указание на направление; на
въпроса кжде: mi iras vilaĝon азъ
отивамъ на село; ŝi iras suben тя отива
долу; la birdo flugas en la ĝardenon
птицата лети (за) въ градината (тукъ
винителниятъ падежъ зависи не отъ
предлога, а изключително отъ смисъла.
Ако кажемъ: la birdo flugas en la ĝar-
deno, ще бжде: птицата лети (изъ) въ
градината).

Следъ предлозитъ al (до, къмъ) и
ĝis (да, при), които сами показватъ на-
правление, винителенъ падежъ никога
не се поставя. (Следва)

Kiril Ivanov, Leskovec, Berkovica,
Bulgarujo, deziras korespondi kun ĉiuj
landoj. Interŝanĝas ilustritajn gazetojn,
poŝtmarkojn, poŝtkartojn. Al ĉiuj res-
pondas tuj.